

LA PROGRESO

ČEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ČESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono K 20.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. —
Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso
no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

B. TITTL:

PREFERE SILENTU...!

(Al so. Friedrich Ellersiek, Berlin.)

La lingvajn barojn sentas plej multe la malgrandaj nacioj. Per sia propra lingvo ili ne povas sin komprenigi kun la mondo ekstera, ĉar ilian lingvon alilandano ĝenerale ne komprenas kaj tial ilia kultura kaj nacia vivo estas eĉ al tre kulturaj nacioj ne multe konata. La samo ankaŭ tuŝas Ĉeĥoslovakion.

Per la efektivigo de la nacia memstaro estis atingita la sopirita idealo de la ĉeĥoslovakoj kaj tial krom sia propra bonstato ili jam nenion deziras kaj atendas de la estonteco. Ili plej varme deziras vivi pace kun siaj najbaroj, ĉar nur la paco garantias ilian naturan evoluon kaj por la daŭra paco ili volas labori per ĉiuj rimedoj.

Tiu ĉi celo, certe aprokata de ĉiuj nacioj, por kiuj la ĝenerala konkordo ne estas nur kaŝcela devizo, trovas malkomprenon ĉe certa parto de germana kaj hungara publiko, kiu pro la malbona sukceso de la mondmilito kulpigas ĉefe la ĉeĥoslovakojn. Kaj en la malamikeco preskaŭ fanatika distingiĝas kelkaj germanaj gazetistoj, kiuj instigas sian nacion kontraŭ ĉeĥoslovakojn kaj ĉefe disvastigas pri ili tra la mondo la plej malbonajn raportojn. Ĉiujn okazintaĵojn en Ĉeĥoslovakio, eĉ tute negravajn, ili scias tiom lerte falsi, ke neniu fremdlandano povas diferencigi la veron de mensogo. Inter la aliaj gazetoj la plej ĉefan lokon okupas germanaj ĵurnaloj »Bohemia« en Praha, kiu malbonuzas la enlandan presan liberecon kaj »Neue Freie Presse« kune kun »Reichspost« en Wien.

El similaj gazetoj ĉerpas multaj alilandaj ĵurnaloj la raportojn pri Ĉeĥoslovakio. Kaj

la falsajn sciigojn la ĉeĥoslovaka presoj ne povas korekti, ĉar la fremdaj gazetistoj ne konas la lingvon de la nacio, kiu antaŭ 200 jaroj jam preskaŭ ne vivis. Pro tiu kaŭzo jam de la komenco de la aperado de La Progreso ni sentis moralan devon enpresadi artikolojn kaj sciigojn pri nia nacio kaj pri nia enlanda vivo por tiel — almenaŭ parte — informi fremdlandajn esperantistojn. Sed ĉiam ni zorgis skribi laŭvere kaj ne ofendi la sentojn de kiuajn leganto, ĉar ni bone komprenas, ke la ĉefa celo de la esperantismo, por kiu ni laboras, estas forigi la gentajn malpacojn, sed ne ilin grandigi, de kiu ideo cetere estas gvidata eĉ nia ŝatata regnestro, prezidanto Masaryk. —

Tial kun bedaŭro ni ekscias, ke eĉ inter la germanlingvaj samideanoj sin trovas personoj, kiuj penas difekti la famon de nia popolo kaj en sia nacia malamo kuraĝas ekskui eĉ la prosperon de la XIII. esper. kongreso, kiu estas entreprenoj ĉiuesperanta, ne nur de la esperantistoj ĉeĥoslovakaj. Ni celas ĉefe la artikolon aperintan en la januara kajero 1921 de »Esperanto-Praktiko« en Berlin, kies redaktoro kaj eldonanto estas la malbonfama so. Friedrich Ellersiek, la konata defendanto de la militaj kruelaĵoj. Ni enpresas parton de la artikolo parolanta pri la XIII.:

„La Dek-dua pasis, vivu la Dek-tria! La ĉefaj Esperantanoj insistis pri la okazigo de la venontjara internacia kongreso en la ĉefurbo de sia nun memstarigita lando; ilia deziro estas plenumita, kaj ili nun montru sian talenton por la aranĝo de granda kongreso. Estas supozeble, ke la Dek-tria fariĝos granda laŭ la nombro de la partoprenantoj, ĉar antaŭ ĉio la valuta problemoj ne malhelpas la viziton al la kongreso. Krom tio Praha (aŭ Prago) kvazaŭ sidas en la koro de Eŭropo kaj tial pli facile estas atingebla ol iu urbo ĉe la periferio de nia kontinento. Ĉu la kongreso ankaŭ en aliaj rilatoj fariĝos granda, ni vidos. — Ekzistas samideanoj, kiuj dubas pri tio. Kial? Nu,

unue pro la malbonfama nombro 13. Por mi ĉi tiu nombro estas kvazaŭ feliĉigilo, mi ŝatas ĝin, ĉar ĉiuj miaj entreprenoj, kiuj iel interriltas kun la nombro dek-tri, sukcesas kaj prosperas (la dato de mia Esperantistiĝo ankaŭ estis la 13a!). Sed inter la Esperantanoj estas sufiĉe multaj superstiĉuloj, por kiuj nombro laŭdire signitas malfeliĉon kaj kiuj evitas ĉion, kio iel interlatas kun ĝi. Alian pli gravan skrupolon havas precipe la germanoj: leginte pri la tumultoj kaj atakoj, kiujn ĉefaj ŝovinistoj kaj popolaĉaroj en Praha kaj aliloke faris kontraŭ samlandaj germanoj, ili timas, ke dum la kongreso ili estos same malbone traktataj. Ne estas eviteble, eĉ dum internacia Esperanto-kongreso montri sian naciecon — kaj pro kio kaŝi ĝin? —, ekz. en interrilitoj kun la kongresloka publiko, kiu ne scipovas Esperanton. Estas tute nature, ke la germanaj kongresanoj, ne sciante la ĉefan lingvon, en Praha provos komprenigi sin al la neesperantista loĝantaro per la germana lingvo, kiu ja sufiĉe multe estas parolata en Ĉeĥoslovakujo. Povos okazi, ke certa parto de la ĉefia publiko malbone akceptos tion kaj en malnobla maniero protestos kontraŭ tia „aroganteco”.

Pri la timo de la nombro 13 mi ridas, sed la timon de la germanoj mi bone komprenas, konante la facile ekklamigeblan karakteron de la ĉefia popolo. Bedaŭrinde estas, ke eĉ ĉefaj Esperantanoj partoprenas en la incitado kontraŭ ĉio germandevena. Mi celas la ĉeforganon de la ĉefaj Esperantanoj: La Progreso. Eĉ ne unu numero de tiu gazeto ne enhavas iun atakon kontraŭ nunaj iamaj institucioj germanaj. „Ni nun estas liberigitaj de la jugo de l' germana kulturo!” Tion aŭ laŭsence tion oni povis legi en iu pasintjara numero de la Progreso. Nu, mi opinias, ke eĉ nun, post la debaklo de Germanujo, la germana kulturo ankoraŭ superas la ĉefan tiom, ke la ĉefoj povas lerni multon de ni. Se La Progreso ne kondukos pli neŭtrale, almenaŭ ĝis la kongreso, la ĉefaj samideanoj ne miru pri manko de germanaj kongresanoj.”

FELIETONO

B. TITTL:

MEMOROJ EL LA DUMMILITA TEMPO.

Ni estis kelkaj, kiuj kunvenadis dum la tuta daŭro de la mondmilito en »nia« kafejo por preparoli la lastajn okazintaĵojn sur la batalkampoj. Tie en angulo staris la tablo ĉiam rezervita por ni, ĉe kiu ni esprimadis niajn esperojn por estonteco kaj kie ni admiralis la heroan sindefendon de la franca armeo.

La kafejo estis ĉiam plena de germanaj kaj hungariaj soldatoj, kiuj okupis nian urbon baldaŭ post eksplodo de la milito kaj samtempe eniĝis en ĉiun gastejon kaj kafejon. En ĉiuj publikaj haloj oni aŭdis laŭtajn voĉojn de ĉi tiuj gastoj, kiuj en nia lando baldaŭ kondukis tre hejmece.

Estis tre danĝere esprimi laŭte sian opinion pri la milito aŭ nur pri la ĝenerala mizera ekonomia situacio, ĉar la ŝtataj

Al ĉiu senpartia esperantisto estas evidente, ke la sola celo de la artikolo estas malutili al la kongreso kaj deteni fremdlingvajn esperantistojn de ĝia vizito. La anonimulo, kiu kaŝas sin post la pseudonimo »onklo Tobias«, por atingi sian malnoblan celon uzas du rimejdon: unue memorigi al superstiĉuloj, da kiuj verŝimile inter ni estas sufiĉa nombro, ke ĵus tiu ĉi kongreso portas la malbonfaman numeron, kaj due, ke ĉiu vizitonto nescianta nian nacian lingvon, kiu eble opinius, ke li sin povos helpi per la lingvo germana en la rilato kun la loka publiko, metus sin en la danĝeron esti atakata de »ĉefia popolaĉaro«.

La artikolo de so. Ellersiek kaj lia »onklo« Tobias estas unu el la konataj friponaĵoj uzataj kontraŭ nia nacio. Se so. Ellersiek volas paroli pri la demonstracioj kontraŭgermanaj en Praha, Plzeň kaj Brno, tiam li devas ankaŭ diri, ke ilin kaŭzis la kontraŭŝtata agado de germanaj fanatikuloj, kiuj ruinigis en Eger (Cheb) la ĉeĥan lernejon de ĉeĥaj infanoj, la atakado al ĉefaj ofiroj kaj soldatoj en la landlimaj urboj loĝataj de germanoj, kaj la perforta kontraŭstaro de la memoraĵoj pri Habsburkoj kaj de ĉio, kio ofendas la sentojn de la »ententaj« nacioj. So. Ellersiek kaj lia »onklo Tobias« ne diras, ke la okazintaĵoj en Praha, Plzeň kaj Brno estis nur resonco de tio, kion antaŭe praktikis aro da germanoj fanatig-

spionoj, kiuj en grandega nombro trapenetrus ĉiujn klasojn popolajn, havis tre delikatan aŭdon. Danke al ilia fervora agado ni Bohemoj ĝenerale alkultimiĝis paroli nur mallaŭte se ni menciis la aferojn publikajn, ĉar ni nevolonte liveris materialon al ŝtataj eŝafodoj aŭ malliberejoj.

Iam la lastaj okazintaĵoj premis nin tiom, ke ni bezonis la proksimecon de tiuj, kiuj sentis same kiel ni. Kaj tie ĉe la tablo de »nia« kafejo ni ilin trovadis, ĉar tie regis la plej intima amikeco.

Nia rondo konsistis el nemultaj personoj: la boneca, ĉiam bonhumora kaj bonkora ĉefrevidento de ŝtataj fervojoj Zikan, la ĉiam trankvila kaj meditema bankoficisto Loukota, alta longulo Šnábl, disputema so. Krečmer kaj mi. En nian rondon apartenis ankaŭ administristo de tagĵurnalo »Nová Doba« so. Remeš, deputitoj Luděk Pik, nun urbestro de Plzeň kaj Gustav Habrman, la unua ĉeĥoslovaka ministro de instruado.

itaj de same senkonsciaj gvidantoj, kiel estas so. Ellersiek kaj lia »onklo«, kiu mensogas dirante, ke La Progreso iam skribis. »Nun ni estas liberigitaj de la jugo de la germana kulturo«.

La du sinjoroj ne deziras, ke iliaj samlandanoj ekkonu la mensogecon de la raportoj vastigataj pri nia nacio. Ili ĉefe ne deziras, ke iliaj samlandanoj — esperantistoj konvikiĝu pri la fakto, ke nia nacio varme deziras trankvilan kunvivon kun nacio ilia, kaj tiun kunvivon malhelpas sole kelkaj incitemaj gazetoj kaj sinjoroj, kiel ekzemple »Ellersiek & Kompanio«.

Kaj ĵus pro tio estas necese, ke eĉ la germanaj samideanoj venu grandare. Ili estu certaj, ke eĉ ili trovos en nia lando varman akcepton kaj ke ili povos senĝene uzi en nia lando sian lingvon nacian, kiu estas parolata en multaj hoteloj, restoracioj kaj magazenoj, same kiel la franca kaj angla.

Kaj so. Ellersiek, kiu dum la milito grave pekis kontraŭ la ideo de la esperantismo, tiu prefere silentu.

ERNEST DENIS.

Kordolora, tre malgaja raporto venis en Ĉeĥoslovakion al 6-an de januaro: mortis tie en sia 72. jaro, filo de la nobla franca nacio, la fama protagonisto de la ĉeĥoslovaka sendependeco, profesoro de Sor-

La vizaĝoj de soj. Remeŝ kaj Pik nubiĝis nur malofte; eĉ en tre malfacilaj tempoj ili esperis ke venos pli feliĉa estonteco. Habrman kontraŭe estis ĉiam tre serioza, kaj tiu ĉi lia karakteriza eco trapenetris eĉ nin, kiam lia alta staturo kun modela angla sintenado aperis inter ni. Lia kapo estis ĉiam plena de zorgoj pri la estonteco de nia nacio kaj mi scias, ke pasis multaj noktoj, kiujn li travivis sendorme. Kiam la milita situacio estis por nia nacio malfavora, ni nur per kelkaj frazoj menciis la efektivan staton kaj penis turni la pensojn de Habrman al alia direkto. Mi ordinare petis, ke li parolu pri Ameriko. Kaj li efektive sciis paroli pri tiu mondparto tiel elokvente, ke antaŭ niaj okuloj baldaŭ aperis la bildo de admirinda amerika industrio kaj de tiea socia vivo. Habrman travivis en Ameriko kelkajn jarojn kaj kvankam forpasis de tiam tre longa tempo, ĉiu lia travivaĵo estas bone fiksita en lia memoro. Per liaj propraj rakontoj ni tiel baldaŭ konatiĝis kun ĉefaj trajtoj de lia

bono Ernest Denis. Kiam li, malsana, antaŭ la Kristnasko veturis el Praha, neniu supozis, ke la katastrofo estas tiel proksima. En la persono de Ernest Denis foriris unu el la kreintoj de nia memstareco. Jam en sia juneco li sin interesis pri nia historio kaj por konatiĝi kun ĝiaj fontoj li venis en jaroj 1872 al Praha kaj restis tie du jarojn, dum kiuj instruis liu pri la ĉeĥa lingvo tiam ankoraŭ juna poeto Jaroslav Vrchlický. Li tie konatiĝis kun nia fama historiisto Fr. Palacký. Post sia reveno en Francion li skribis en 1878 sian unuan grandan verkon el la bohema historio »Hus kaj la militoj hus-anaj« laŭ kiu li estis deklarita doktoro kaj poste profesoro de la universitato en Bordeaux. Karakteriza momento el lia promocio estas ne multe konata: Unu el la ekzamenantoj demandis lin, ĉu li scias, ke en mezepoko li estus pro sia verko bruligita. Kaj li respondis: »Jes, tion mi scias! Sed mi scias ankaŭ, ke danke al la bravaj husanoj tio ne okazos!«

En 1890 aperis alia granda verko pri bohema historio »Fino de la bohema memstareco«, per kiu Denis fariĝis sekvanto de nia Palacký, kies verkoj traktas pri nia historio sole ĝis 1526. En 1896 fariĝis Denis profesoro de Pariza Sorbono kaj en 1902 li aperigis sian ĉefverkon »Bohemio post la Blanka Monto«. Ambaŭ ĉi tiuj verkoj estas tradukitaj bohemen de prof. Dr. J. Vančura kaj apartenas inter la plej gravajn verkojn pri nia historio. Dum la mond-

lia interesa vivo, pri lia infanaĝo, pri lia vivo en aŭstria fortikaĵo Stein, kie li pasigis kvar jarojn estinte en Wien kondamita pro »ĉefperfido«. (Li estis organizinto de la socialista movado en Wien.) Liaj rakontoj pri lia vivo en Parizo kaj sur la insulo Kuba, kie li persone partoprenis la revolucion, forkondukis niajn pensojn de la malfavora estonteco.

Deputito Pik estis ĉiam bonhumora kaj gaja ĉar eĉ plej malfavora situacio ne povis skui liajn esperojn. Nur unufoje mi vidis lin kortuŝita kaj premita: ĝi estis en la antaŭlasta jaro de la milito. Tiam li estis ĉefa gvidanto de la striko en la kanonfabriko »Skodawerke« en Plzeň. Per la striko li volis malutili al la militado, sed sciiginte, ke la registaro volas en sango dronigi la strikon, li ordonis reveni al la laboro. Kaj tiam liaj politikaj malamikoj trovis bonan okazon por ĵeti sin kontraŭ li: Ili komencis vastigi la famon, ke li estas subaĉetita de la fabriko. Efektive, tiu viro de fera energio neniam estis pli

milito kuniĝis Denis kun Masaryk kaj komencis energie labori por renovigo de nia sendependeco. Li eldonadis revuon »La Nation Tchèque« per kiu li celis konatigi la legantaron kun nia nacio.

Kiam fine alvenis nia granda tago, Denis ĝojis same kiel ni. Li estis ne nur nia amiko, sed nia vera patro, kiu amis nin senfine. Eĉ en lia lasta letero, adresita al prezidanto Masaryk, per kiu Denis adiaŭas nian nacion estas videbla lia amo kaj zorgo pri nia estonteco.

Nia tuta nacio funebras por tiu ĉi nobla fremdulo, kiu por sia laboro fariĝis nia nacia heroo.

ESPERANTISMO

XIII. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

de la 31. julio ĝis la 6. aŭgusto 1921 en Praha — Ĉeĥoslovakujo.

IV. Komunikoj.

Komitato. Propaganda sekcio estas dividita en la sekciojn: por eksterlanda propagando (sekretario So. Silha, landa asistento) kaj en landa propagando (So. Bouška).

Subkongreso I. Kongreso de Liberiga Stelo, internacia asocio de antaŭenemaj esperantistoj.

Fakaj kunvenoj. Por sportistoj — aranĝas Universala Sportligo (sekretario So Pedrazzini en Locarno, Svisio) — komercistoj — Dro Unger, redaktoro de Internacia Komerca Revuo en Zürich — Centra poŝtako 6104 — psikistoj (spiritualistoj) — So Sklenčka, delegito de U. E. A. en Hradec Králové — Ĉeĥoslovakujo — anoj de malgrandaj nacioj — prof. Fridrich en

malfeliĉa ol en tiu tempo. Vere la politiko iam elektas vovojn tre nepurajn...

Nia societo subite pligrandiĝis: En la Esp. Klubon alvenis kapelestro de la loka hungara regimento, tie oni parolis kun li esperante, en la opinio ke li estas hungaro. Sed post nelonge al mia demando li ridante konfesis, ke li estas fidela bohemo, naskita en orienta Bohemio. En Hungario li jam travivis 13 jarojn, sed sopiris reveni en Bohemion, kiun sopiron efektiviĝis al li la milito. Pri sia fideleco al la nacio bohema li konvinkis nin per la fakto, ke li lasis enskribi du el siaj du el siaj infanoj en boheman lernejon, kvankam per tiu ago li metis sin en la danĝeron, ke oni rigardos lin tre malfavore ĉe lia regimento. Tiu sinjoro estis Horák, la nuna kapelestro de la 18. ĉeĥosl. regimento en Plzeň kaj vicprezidanto de tiea esp. klubo. Li baldaŭ fariĝis fervora vizitanto de niaj kunvenoj en la kafejo kaj per sia ofitira uniformo gardis nin antaŭ la spionoj. (Daŭrigota.)

Prostějov — Ĉeĥoslovakujo — framasonoj — So Faulhaber, sekretario de Universala Framasona Ligo — Amsterdam — Borgerstraat 103.

Aliĝoj. 32. So Oberrotman el Warszawa, 33. So Deubler, München, 34. So Kobiela, Karvin, 35. Fo Kubičková, 36. So Procházka, Odrlice, 37. So Bramkamp, 38. Sino Bramkamp, Schweringen, 39. Fino Jakobs, Flensburg, 40. So Arabeno, Genova, 41. Sino Sabev, 42. So Sabev, Stolat, 43. So Ludvik, Přerov n. L., 44. Johne Potschappel, Dresden, 45. So Loy, 46. Sino Loy, Kronach, 47. So Loveček, Holešov, 48. So Mastný, 49. Sino Mastná, Olomouc, 50. H. Baranek, Karvin, 51. So J. Baranek, Karvin, 52. Tlodka, Orlová, 53. So Dro Unger, Zürich, 54. So Wilbert, Köln, Deutz, 55. So Zapater, 56. Fino Zapater, Köln, 57. Fino Jedrzejewska, 58. So Becher, Bydgosz.

Garantia fundo. Samideanoj (precipe el landoj kun bona valuto) enskribu almenaŭ unu enskribon po 100 ĉeĥoslovakaj kronoj!

Deponado de la mono en Praha. Oni sendu pere de kiu ajn banko al la banko „Bohemia“ en Praha je la konto de la XIIIa Universala Kongreso de Esperanto la deponotan sumon, aŭ en sia nacio valuto, kiun elpagos al Vi la Kongresa monŝangejo en ĉeĥoslovakaj kronoj laŭ la kurso de la kurso de la tago de la monakcepto, aŭ en ĉeĥoslovakaj kronoj, kiuj estos elpagotaj kun procentoj. Pri la monsendo sciigu ĉiam — samtempe la ĝeneralan sekretarion de L. K. K. —

Donacoj. So van Heek el Hengelo (Nederlando). 30 G. N. Kursanoj de So Dro Fousek el Přebouč 57 K. —

Vojaĝaterojn (biletojn, transporton de la valizoj, informojn ĉiurilatajn) prizorgadas al la kongresanoj „Čs. Cestovní a dopravní kancelář“ (Vojaĝ — kaj transportoficejo, fondita de la ministerioj por komerco kaj fervojoj) en Praha II., Mikulandská ul. č. 7.

Remarkigo. La redakcioj estas petataj sendiregule unu ekzempleron de sia gazeto al la Loka Kongresa Komitato en Praha!

Adreso por nur prikongresaj korespondadoj kaj oficialoj aliĝoj: So Aug. Pitlík, komisario ĉe komercministerio, ĝenerala sekretario de L. K. K., Praha III., Nerudova 40.

Loka Kongresa Komitato.

V. Komunikoj.

Teatra prezentado: Oni ludos esperantlingven tradukitan klasikan ĉefan komedion „Noc na Karlštejně“ (Nokto en Karlštejn) de Jaroslav Vrchlický, ĉefa poeto kaj verkisto.

Faka kunveno. Por sciencistoj — organizas Dro Kamaryt, Profesoro en Bratislava, Tělocvičná 3. La interesuloj pri la fakaj kunvenoj sin turnu al la ĝis nun publikigitaj organizantoj).

Kotizajo. 25 frankoj — oro (antaŭmilita valoro) — 5 dolaroj, 12 nederlandaj guldenoj, 20 ŝilingoj, skandinavaj kronoj, germanaj markoj, 25 frankoj, liroj, dinaroj, drakmoj, pesetoj, ĉeĥoslovakaj kronoj, aŭstriaĵaj kaj hungaraj kronoj, polaj kaj finaj markoj k. t. p. Pluaj samfamilianoj pagas nur 60 proc. de la kotizajo. Post la 1. de junio 1921 altiĝos la kotizajoj je 50 proc.

Ĉiu pagas en sia ŝtata valuto! La sumon sendu pere de kiu ajn banko al la banko „Bohemia“ en Praha je la konto de la XIIIa Universala Kongreso de Esperanto kaj sam-

tempe sciigu pri la aliĝo kaj mense la ĝeneralan sekretarion!

Aliĝoj. 59. So Orzech el Inowroclaw, 60. Fino Boon, den Haag, 61. So van Doorne, 62. So de Beur, 63. Hoefnagel, Rotterdam, 64. So Looy, Barendrecht, 65. So Leichert, Potschappel, 66. So Prokop, Starkoč, 67. So Sklenčka, 68. Fino Dolanská, 69. Fino Sklenčková, 70. So Feigl, 71. So Tausig, 72. So Faltin, 73. Fino Marešová, 74. So Juna, 75. So Mitlehner 76. So Charvát, 77. So Černý, 78. Fino Kozová 79, Fino Kopecká, 80. So Freund, Hradec Králové, 81. So Poppe, Pardubice, 82. Fino Veselá, Č. Skalice, 83. Fino Bergrova, 84. So Berger, Moravany, 85. So Nosek, 86. Fino Nosková, Dvůr Králové, 87. So Císař, Dobruška, 88. So Čermák, 89. Fino Rösslerová, Ústí n. Orł., 90. So Balíček, 91. So Adámek, 92. So Keyzler, 93. So Netval, 94. So Vlček, 95. Fino Kulhánková, 96. Fino Keyzlerová, Červený Kostelec, 97. So Nývlt, Lhota za Č. K., 98. Fino Kučerová, Kyšperk, 99. Fino Fyznerová, Hořice, 100. So Plank, Jabloné nad Orlicí, 101. So Cart, Paris.

Garantia fundo. Garantia almenaŭ 100 ĉeĥosl. kronojn! (Vidu a III. Komunikon.)

Donacoj. Ĉeĥoslovaka komercministerio — 10.000 K, So Zedník en Berlin, 100 K, Finoj Marie kaj Nina Silbersteckenovy 100 K, iliaj lernantinoj 30 K, So Harna en Holice 10 K.

Deponado de la mono en Praha. (Vidu la IV. an Komunikon!)

Vojaĝaferoj. (Vidu la IV. an Komunikon.)

Adreso por aliĝoj kaj nur pri kongresaj aferoj: Aug. Pitlík, ĝenerala sekretario de la Loka Kongresa Komitato, Praha III., Nerudova 40. (Por la respondo aldonu respondkuponon aŭ naciajn poŝmarkojn!)

ooo

SCIENCISTOJ EN LA 13 KONGRESO.

Estas bezone, ke la sciencistoj — esperantistoj havu post longa tempo denove okazon pridiskuti gravajn temojn, kiuj interesas esperantismon egale grave kiel la sciencon. La 13. kongreso estos okazo por tio. Oni certe bone scias, ke la scienca progreso ne efektiviĝas dum sciencistaj kunvenoj, sed oni egale certe scias, ke oni multon profitas aŭskultante saĝajn raportojn pri la akiritaj sukcesoj kaj meditante dum la diskutado, kio nun estas farota kaj antigota. Tre grava, ĝojiga kaj instruema ĝuo estas en la dumkongresa kunveno aŭskulti raportojn pri la ĝis nun atingitaj rezultatoj en la esperanta faka scienca terminologio, kiujn prelegos fakuloj de koncernaj sciencoj. Mi organizos tiajn raportojn laŭ ĉiuj sciencoj kaj petas sinjorojn kolegojn pri afabla sciigo, pri kia scienca terminologio ili estus pretaj raporti (mi mem faros raporton pri la ĥemio). La raportoj eldonitaj poste en libro estos certe instrua lingva verko de esperanto.

Ĉiujn koncernajn proponojn bonvolu afable sendi (kun respondkuponon aŭ neuzitaj poŝmarkoj) al

Dr. Stan. Kamaryt,
profesoro de reallernejo en Bratislava,
Tělocvičná 3. Ĉeĥoslovakio.

IDO EN RUSIO.

Dum mia okjara restado en Rusio mi havis tre malmulte da okazoj trovi idiston aŭ almenaŭ aŭdi pri Ido, kaj mi povas diri, ke de la mondmilito, kiam forfalas la katenoj el la rusa popolo kaj la epoko ekfavoris Esperanton, Ido estis al la publiko preskaŭ entute nekonata.

En 1916 mi ekaŭdis la unuan fojon pri idistoj — ĝi estis en Samara — kaj mi ilin ankaŭ vizitis. Ĝi estis du gimnazianoj, kiuj batalis kontraŭ Esp., kulpigante ĝin pro gravaj eraroj, sed tamen Idon ili mem ne parolis, kvankam, laŭ iliaj vortoj ĝi estas multe pli facila ol Esp. Multe pli interesa renkonto kun idisto okazis al mi en Buguruslan (gub. Samara). Tie estis militista kujrejo por traveturantaj soldatoj, kie oni okupis bohemiajn kaptitojn, ĉe kiuj mi vekis intereson por Esperanto kaj organizis esp. kurson. Por tiu celo mi alveturadis el Abdulin. La novaj adeptoj baldaŭ algluis sur la pordon grandan stelon, per kiu ili atentigis sian komandanton princon V. A. Chovaŝskij. Kiam oni klarigis al li la aferon, li petis, ke mi lin vizitu. Kiam mi venis, opiniante ke li estas esperantisto, mi komencis paroli esperante, sed princo respondis ruse. Mi baldaŭ ekkomprenis, ke li estas idisto. Mi menciis, ke ido malutilas la ideon de la lingvo internacia, kvankam ĝi havas saman celon kiel Esperanto. La princo riproĉis esperantistojn ke ili kontraŭstaras ĉiujn reformon kaj kiam mi atentigis lin, ke pro la graveco de la afero mi mem volas submetiĝi al majorito kaj ke li eble en tio tute konsentas kun mi, li fariĝis pli amika kaj petis min veni pli ofte.

Dum unu el la sekvintaj vizitoj li donacis al mi multajn esp. librojn kaj portreton de Zamenhof kaj konfesis, ke pro personaj malpacigoj kun ĉefan espistoj en Moskva li fariĝis idisto. Kiam li ne volis ke la apudaj personoj ne sciu kion ni parolas, li uzis esp., kiun li parolis perfekte.

Kiel legiano mi venis en 1919 al Irkutsk, kie oni inaŭrigis esp. ekspozicion kie mi ĉeestis. Inter la unuaj gastoj estis princo Chovaŝskij. Sed la renkonto ne estis al li agrabla, ĉar li deziris esti nekonata. Mi lin prezentis al la gvidantoj, kiuj sciis pri lia agado kvankam ili ne konis lin persone kaj mi povas diri, ke ili estis al la princo tre afablaj.

Chovaŝskij estis ĉefa propagandisto de Ido en Rusio por kiu celo li dediĉis gravan monsumon. Idon tamen li ne parolis.

Pli da idistoj en Rusio mi ne trovis kaj mi opinias, ke ili estas tre malmultaj.

Jar. Hebký.

RIMARKOJ.

pri konferenco de fervojistoj en Hago.

Dum la XIIIa t. m. Esperanto Kongreso en Hago okazis merkrede la 11an de aŭg. 1920 krom aliaj ankaŭ la konferenco de fervojistoj. La ĉeestantoj, precipe kelkaj viglaj Nederlandanoj, plendis je nunaj Esperanto vortaroj, ĉar mankas en ili teknika terminaro, speciale la fervoja t., kiun ni fervojistoj nuntempe jam urĝe bezonas.

Al tiu ĉi temo donis okazon la komuniko de ĉeĥoslovaka delegito J. Blažek, ano de Esperantista societo en Olomouc. La dirita societo dissendis en januaro 1920 al ĉiuj fervojadministracioj, kun kiuj la Ĉeĥoslovakio havis ĝis nun interrilatojn, cirkuleron esperante skribitan, kies enhavon la plejmultaj el ili bone ekkomprenis kaj ankaŭ favore respondis. La cirkulero pritraktas grandajn ĉiutagajn malhelpaĵojn okaze ofica korespondado kun fremdlandaj fervojadministracioj. Diversajn polajn, rumunajn, jugoslavajn, italajn, germanajn, francajn oficleterojn, demandojn k. t. p. oni ne povas perfekte kaj rapide respondi, tial estus rekomeninda korespondado en Esperanto, ĉar ĝi estas jam uzata en la tuta mondo. La lernado de Esperanto lingvo daŭras kelkajn montajn, la lernado de iuj alia viva lingvo kelkajn jarojn. Rilatajn respondojn sendis jam la svisa kaj la Norvega, la jugoslava kaj la pola (Varsovia) administracioj, la Budapesta fervojministerio; por nederlandaj fervojoj respondis delegito de U. E. A. el Amsterdamo, ĉar la fervoja sekretario ne komprenis la enhavon de esperanta cirkulero. Sed la konferencen partoprenis unu ministeria fervojofocisto, kiu miris pri tio. Ankaŭ la bavara fervojadon sendis favoran respondon, sed por efikigi tian aranĝon, ĝi opinias, estas necese aranĝi ampleksan organizon. Plej multan intereson esprimis la germanaŭstria ministerio kaj la direkcio de la Kašovsko Bohumínska fervojo en Těšín. Ili ambaŭ deziras, ke la fervojdirekcio Olomouc mem tuj komencu ofickorespondadon nur en Esperanto kaj bedaŭras, ke oni jam longe ne komencis esperante korespondadi en internaciaj rilatoj.

Tiun ĉi raporton oni vigle preparolis, ĉar kelkaj konferencanoj sciigis jam antaŭ la intern. E. kongreso pri tiu ĉi cirkulero kaj ili donis tuj diversajn proponojn, konsilojn k. t. p. precipe, ke oni nove eldonu fakgazeton, eble kiel estis la „Fervoja Esperantisto”, kiu malaperis dum la milito. Fine estis decidite, ĉar ankaŭ la s-roj direktoro kaj redaktoro de U. S. A. konsentas kun tio, ke ĉiu fervojisto alsendu la koncize skribitajn koncernajn proponojn, artikolojn k. t. p. al la nuna „Esperanto” gazetadm. de U. E. A. en Bern; la nomitaj s-roj promesis persone al la ĉeĥosl. delegito, ke ili volonte rezervos en la „Esperanto” anguleton por fervojaj raportoj, ĉar speciale la kompletigo de nuna Esperanto-vortaro estas ankaŭ en intenco de U. E. A. Estis tial decidite, subteni la U. E. A., kiu aranĝas ĝustatempe tiusamajn laborojn t. e. kolektadon de teknikaj vortoj por ĉiuj fakoj kaj profesioj samtempe. Bonan proponon en tiu ĉi rilato donas s-ro J. Bal, Bureaureferento en Breda, Holando, kiu praktike konsilas: „Ĉiu fervojisto aĉetu tuj kajeron [10 centoj (2 K ĉsl.) sufiĉas] por fari rimarkojn pri nia terminaro. Oni rekomendis pluen daurigi la eldonadon de malaperinta „Verein der deutschen Eisenbahnverwaltungen” en

Esperantolingvo. Kelkaj diskutis ankoraŭ pri malhelpaĵoj, kiujn faros la nuna stato, ke nur malmultaj fervojistoj scias bone Esperanton, kaj ankaŭ pro tio, ke eĉ la spertaj Esperantistoj ne povos facile deĵori en Esperanto pro manko de tekn. terminaro. Tiujn ĉi malfacilaĵojn oni ekvidos jam en la estonta jaro dum la XIIIa t. m. E. K., ĉar ne estos agraba la situacio por fremdlandanoj, kiam ili ne povos interkompreniĝi dum la fevoj (tram-) veturado. Niaj stacistoj, transportoficistoj, gekasistoj, geketelegrafistoj kaj precipe la vagonar (tram-) konduktoroj tute alie ekŝajnos antaŭ la fremduloj, kiam ili kompreneble respondos la donitajn demandojn. Se ni fervojistoj volas gardi bonan reputacion de nia kara respubliko, tiam ni devas tuj diligente komenci lerni Esperanton, por ke ni ĝin bone eklernu ĝis aŭgusto 1921. Ni haltu principon! ĉiujn demandojn aŭ dezirojn de fremdaj Esperantistoj ni respondu, plenumu ne nur komplemere, sed ankaŭ ĝuste (ne rapide paroli!), ĉar tio elvokas ĉe ĉiu fremdlandano ne nur dankon sed ankaŭ respekton. Pri ĉiuj tiuj spertoj en nia lando ili ofte volonte sin rememoros kaj ankaŭ al la konatuloj en sia hejmo rakontos.

La konferencanoj — ankaŭ fotografaĵoj en formo de memorvidaj-kartoj ĉe la fo. Fotoamericaine, Wagenstrat 10 Hago — tute kontentaj kun la rezultato de neatendite aranĝita fervojkonferenco, disiris kun la deziro, denove aranĝi nian fakkonferencon dum la XIIIa ĝenerala kongreso en 1921 en Praha.

J. Blažek.

LITERATURO

PERDIDA VOJO.*)

Ĉefe verkis Karel Čapek. Tradukis Stan. Kamaryt.

- »Sed ni perdis la vojon!«
 »Evidente.«
 »Kien ni nur venis? Ĉu vi vidas ion? Kie estas la aleo?
 »Mi ne scias.«
 »Kie ni estas? Ĉu vi iam vidis, ke estus estinta tie ĉie ia erikejo?«
 »Ne.«
 »Sed kiel ni nur povis perdi vojegon? Ni tamen estus irintaj trans ŝoseo — Atentu, ĉu ni ne iris eble trans ŝoseo?«
 »Mi ne scias.«
 »Tio estas absurda. La vojego ne povas tamen perdiĝi sub la piedoj. Kie vi estas?«
 »Mi sidiĝis.«
 »Sur vojo oni iras tamen alie ol tra herbo. Malmole kaj laŭte. Ĝuste tiel mi aŭdis nin irantajn sur la vojego.«

Pri la aŭtoro. Karel Čapek estas juna nun ĉirkaŭ tridekjara ĉeĥoslovaka verkisto, aŭtoro de ĉiam spiritoplenaj noveloj, rakontoj, estetikaj filozofiaj studaĵoj. La jaron 1920 estis eĉ unu lia komedio prezentata en la plej ĉefa teatro de Praha. Ankaŭ li skribis popularan libreton pri la pragmatisma filozofio. Laŭ profesio li estas ŝatata ĵurnalisto.

»Estis vi, tiel brue iranta.«

»Des pli! Estas ja rekte nepensebla... Tio estas la plej mirinda, kion mi iam... Homo, ne dormu!«

»Mi ne dormas.«

»Kie ni efektive estas?«

Gi estis malluma kaj preskaŭ senstela nokto; sole iom da dubblanka ŝtonaro sur la tero kaj malgrandaj supreniĝantaj juniperoj similaj al malgrandetaĵ, senmovaj statuoj; sole el malproksimo krio de uhuo enborigis nekonatan malproksimecon en staran mallumon.

»Ne ridu pri mi,« diris la staranta viro, »sed al mi tie ĉi ne plaĉas. Ni komplete perdis la direkton. Ni devas veni sur ian vojon, konduku ĝi ien ajn; la vojo parolas almenaŭ, antaŭen, sed la senvojeco silentas. La senvojeco estas iele odoranta per senfineco; ĝi estas tie ĉi en ĉiuj partoj ĉirkaŭ ni; aŭdu ĝi estas nepovebla situacio.«

»Sidiĝu,« diris la dua.

»Mi ne volas. Mi sidiĝos poste ie apud vojo, en mezon inter la dekstran kaj la maldekstran manon, ke mi sciu, kie mi estas. Kiu iras sur vojo, al tiu estas la mondo dekstren kaj maldekstren kuliso sen signifo kaj muroj de longa koridoro; sed senvojeco estas kiel supraĵo de la monto; tro en la tutmondo; tro malfermita ĉiujn flankojn. Ni iru for tie ĉi!«

»Atendu ankoraŭ, mi ne povas.«

»Ĉu okazis io al vi?«

»Mi ne povas. Jes, okazis al mi io. Mi trovis ion, ĵuste kiam ni komencis perdi la vojon. Eble precize en tiu momento.«

»Kie ĝi estis?«

»Mi ne scias. Subitege ĝi montriĝis al mi. Jam dum ĵaroj mi ne pensis pri tio, sed nun ĝi venis mem. Eble ĵuste pro tio, ke ni subite perdis la vojon.«

»La rememoro?« »Rememoro ne. Solvo. Respondo. Io, kion mi serĉadis dum la tuta vivo, eĉ kiam mi ne pensis pri tio. Oh, Dio, ĝi estas terure komplika! Per tio mia tuta vivo ŝanĝiĝas — Ĉio kontinuas. Ĉu vi komprenas?«

»Absolute ne!«

»Eĉ mi ne. Evidente mi devis perdi la vojon, por tion trovi. Foriri for ĉio, kion vi scias! Tial ili iradis dezerton! Sed forlasu domon vian kaj familion vian; via logiko estas teksita el kutimoj kaj viaj vojoj el miloj de pasintaj paŝoj; tial foriri for ĉio kaj komencu vagi, por serĉi en nekonato. Kaj vin mem poste vi trovos

en tio, kiu estas la plej mira kaj la plej nekutima.«

»Tion vi diras al mi?«

»Tion mi diras al mi, ĉar mi tion trovis. Vin mem vi trovis kaj ne povas vin koni; kaj tamen ĝi estas la solo, kion vi iam serĉadis. Mia Dio, tiom da ĵaroj! Kaj subite tiu solvo: venos al vi ĝoja kaj senvorta sento, ke tio estas tie ĉi; tio, kio ne estas ankoraŭ penso, sed sole brileganta tempo, kaj mirakla certeco. Atentu, mia vivo videble ŝanĝiĝos, eble niaj vojoj disiros; sed mi ĝojas, ke mi travivis tiun momenton kun vi.«

»Se vi almenaŭ dirus al mi — —«

»Mi ne povas. Nun ankoraŭ ni ne povas ion diferencigi. La veron vi devas asimilacii kiel senton pli frue, ol ĝi fariĝas vorto. Vi devas en ĝi eniĝi kiel en la spaco, kiu nenien kondukas, sed malfermiĝas en ĉiujn partojn; ĉar via pensado estas sole kiel vojo laŭ unu direkto, kiel koridoro inter du muroj. Via pensado iras sole antaŭen sur ia de multaj vojoj; sed la sola vero iras nenien kaj nenien celas, sed staras kiel diseco.«

La staranta viro silentis kaj streĉe li aŭskultis malproksimen. En milopa silento de la vasta nokto, ŝajnis al li, evoluigis ie peceta, senvoĉa ritmo. Ĝi ŝajnas esti superverŝite per malkurbeco de silento, sed ĝi estas tie ĉi kaj senhalte ĝi malbaras al si la vojon. Homoj paŝoj! malproksimaj frapoj sur malmolan vojon! La staranta homo ekspiregis.

»Tie do estas vojego,« li diris kaj subite miris pri sia voĉo; tiom pli klare kaj pli kolore ĝi sonis ol antaŭe.

La sidanta viro kiel estus vekiginta; »Kio? Vojego? Vi iam iros hejmen?«

»Vi eble volas resti tie ĉi?«

»Jes, mi poste klarigos tion al vi. Ĝi estas grandege komplika. Atendu ankoraŭ!«

Ekspliku tion al mi dum la irado!«

»Se mi povus skribi tion por mi! Kio ĉio venas en mian cerbon! Oh Dio, kiel sennombre!«

»Skribu tion hejme. Mi jam kondukos vin.«

»Mi dankas vin. Kie ni estas?«

»Mi ne scias, iru sole. Atentu, tie ĉi estas abismeto!«

»Mi vidas nenion.«

»Donu al mi la manon! Kristo, kiel ni venis tien ĉi? Atentu!«

»Atentu, tie ĉi oni ne povas... Ni iru retro!«

»Tio ne estas povebla, la vojo estas antaŭ ni. Kie vi sidas?«

»Tie ĉi supre. Kaj vi?«

»En akvo. Restu tie, oh! Nenio okazis al vi?«

»Ne, mi dankas. Mi ja estas jam malsupre.«

»Nun iru post mi. Tiel!«

Kaj la ambaŭ viroj iris supren kaj denove malsupren; ĝi estis penplena, tranĉea kampo, kie ili devis iri kun milfoja atenteo; estis tie arbitaro, tra kiu ili devis premi sin; estis tie vastaj, prilaboritaj kampoj, trans kiuj ili ekkuris kiel porkoviroj. Fine ŝoseo kaj vojego.

»Kaj nun diru al mi« ekdiris tiu, kiu iris antaŭe, »kiel ni entute povis enigi nin tien supren?«

»Mi ne scias,« diris la dua iom korpremite, ĝi estas laŭvere iom stranga. Mi devus mediti pri tio... Mi havas nun tiom por pensi!«

»Ĉu vi rakontos al mi jam, kion vi trovis?«

»Jes. Ĝi estas tiel stranga koncerne tiun devojiĝon! Certe oni tion trovis en la momento, kiam ni perdis la vojon. Ke mi estu jam hejme!«

»Kion tio koncernas?«

»La animon...«

Nun ili ekpaŝis ambaŭ rapide kaj silente; ili trairis arbaron kaj trakuris vilaĝon; iom da fenestroj homece lumis en la profunda mallumo; kaj denove malfermiĝis vastaj kaj malproksimaj herbejoj.

»Kion do vi volis diri?«

»Pri kio?«

»Pri tio, kion vi trovis tie supre. — Pri la animo.«

»Ah, jes, vi estas prava. Ĉu mi diris, ke pri la animo? Pli bone ĝi estis aliaj problemoj, pri la vivo ĝenerale... Jus mi pensadis, per kio komenci.«

»Per tio, kio eklumis al vi plej komence.«

»Plej komence? Tio estis sole intuicieto — — — Estas malfacilege formuli tion. — Laŭvere mi ne scias, kio eklumis al mi plej komence. Ĝi venis ĉio tiel tuje!«

»Do komencu per io ajn.«

»Tio estas nepovebla. Ĉio estis unu tuteco... Jes, ĉio klare kontinuus. Ke mi povu sole kunpreni ĉion!«

»Ĉu vi rakontos tion al mi iam alian fojon? «

»Ne, pli volonte tuj nune. Mi sole iom ordigos tion. Sed min malhelpetas tio, ke ni paŝas tiel laŭte.«

»Do ni sidigu.«

»Jes, mi dankas vin. Antaŭ ĉio premisin... Ĝi tiel klare eklumis al mi — — Unue sekvas el tio, kiel maltaŭga kaj senseca estis ĉio, kion mi ĝis nun vivis. Tuj ĝi trapenetris min kiel tranĉilo; mi ektimigis min mem kaj mi komprenis, ke tiom da jaroj, oh Dio, mi vivis sole la neeldireblan kaj nekonsciatan doloron. Tiom da jaroj! Do tio eklumis al mi, kio mi estis kaj kiel mi nesciante suferis; kaj ĉio estis vanta kaj erara, kaj malvasta kiel malliberejo; kaj al mi estis terurege, kiam mia tuta vivo malaperis kiel trovita eraro. Oh, multon ankoraŭ mi eksplikos al vi detale. Sed due, atendu, due — —.«

»Kio estas due?« demandis la kamarado post tempeto.

»Atendu, estis en ĝi tamen io pri la animo, sed nun mi ne scias... Jes, estis en tio io senmezura pri la animo. Dio, kio estis tio?«

»En kia senco pri la animo?«

»Mi ne scias, ĝi entute ne estis vortoj, ĝi estis sole certeco — Ĝi estas tiel forflugema!«

»Rememoru tamen!«

»Jes, tuj. Io pri la animo? Kio estis tio?«

»Pensu nur, mi atendas.«

»Mi dankas vin. Tuj mi trovos tion.«

La tempo de la nokto estis metinta sin senmove sur nigraj kaj senformaj objektoj. Kaj jen, nun la unna matena homo iras sur la malplena vojego. Ĉu ĝi ne estas krio de koko en vilaĝo? Ĉu la nokto ne ekmoviĝis en sia silenta interno?

»Ĉu vi trovis tion?«

»Ah, tuj. Sole ion ankoraŭ — — —«

Sur horizonto ĝi malforte eklumiĝadis. La tero kaj ĝiaj objektoj akceptadis malvarmetan, fantoman palecon; daŭre ili ekstariĝadis pli blanke kaj pli precize; kaj ĝi estis la lumo.

»Do kion vi trovis?«

»Mi ne scias... Ĝi malaperis al mi. Ĉion mi perdis, kaj neniam mi tion scios.«

»Kaj absolute nenio, entute nenio restis al vi el tio?«

»Absolute nenio; sole tio, kio por ĉiam eklumis al mi pri mia vivo.«

El «Diaj suferoj» (Praha 1916).

MARKO KALINA:

PRELUDO^{*)}

Estas sur tero ia pri feliĉo
 Legendo ĉarma, vaganta tra mondo.
 Ĝi per smeralda sorĉanta rigardo
 Profunde homan penetras okulon.
 Per fantaziaj ĉenoj ĉielarkaj
 La sentojn dolĉe katenas, sklavigas,
 Kaj la venenon kun rideto reva
 En homan koron tiel milde verŝas,
 Ke homo suĉas ĝin ĝis la forgeso —
 Ĝis nekoscio de la realaĵoj.
 De tiam homo iras tra la vivo
 Duonfreneza, duonesvenita,
 Kaj kvankam suno lumigas la tagon,
 Homo rimarkas nek tagon, nek sunon,
 Sed palpe serĉas, kiel la blindulo,
 Kaŝitan vojon al mistera revo.

∞∞∞

LA FINO.

Mi forgesis ambaŭ, maljunan malsanan
 regimentestron. Klen kaj lian nevinon Ani-
 ta. Longa tempo pasis, kiam mi ilin vizit-
 adis. Pasintaj tempoj...

Subite mi ricevis la sciigon kun larĝa
 nigra rando »Post longa malsano silente li
 mortis...« Tiel denove reviviĝis en mia
 penso la remomoro je li. Kvazaŭ mi vidus
 lin stari kontraŭ mi: Maldikega alta figuro
 malmulte klinita sur malfirmaj malleviĝin-
 taj okuloj, malsprite, lace, sen intereso; ili
 ekkonis nenion kaj ankaŭ nenion diferen-
 cigis, eĉ min neniam konis. Ili estis la oku-
 loj de silenta frenezulo — homo freneza...

Milano Klen jam de longe estis provi-
 siulo; pro sia malsano. »En unua etaĝo tuj
 super mi li loĝokupis kvar luksajn ĉam-
 brojn. Kiam mi konatiĝis kun Anita mi vi-
 zitadis ilin ofte.

Mi ne povis klarigi al mi mem, kial
 Anita oferis la plej belegan tempon de sia
 vivo al tiu ĉi homo. Li estis ŝia onklo,
 kompreneble, sed mi pensas, ke la grand-
 animeco de Anita superis ĉiujn parencajn
 kunligojn kaj ĉiujn familiajn tradiciojn. —
 Estis en tio eĉ la heroismo servi al spirit-
 malsana homo kaj lasi dume senflorigi ne-
 fruktoporte sian propran junecon...

Mi ne flatas min, se mi diros, ke Anita
 ĝojadis, kiam mi alvenis. Mi vidis tion el
 ŝiaj okuloj, kiuj ĉiufoje prenis molan mie-
 non, eĉ en ŝia vizaĝo, kiu reviviĝis kva-

*) El „Kanto pri vivo”, poemo en tri partoj. (En manuskripto.)

zaŭ kontraŭ ŝi la radioj de la suno estus
 apogintaj, kiu tiel longe, longe ne brilis.
 Ja tio ne estis gaja vivo, kiel vivis Anita.
 Kiam ŝi enkondukis min en la ĉambron kaj
 sidiĝis kontraŭ mi, ŝi ekkomencis preskaŭ
 ĉiufoje stereotipe: »Mi malfermos la fene-
 strojn, ĉu vi volas? Estas ĉi sufokige...«
 Kaj mi komprenis al ŝi.

Kvar ĉambroj plenaj de lukso, estis ĉi
 tie en la vico... Kaj ilia malserena silento
 kun terura pezo kuŝiĝis je animo. La por-
 tretoj sur la muroj, ŝajnis, kvazaŭ malfer-
 mege rigardis el orumitaj kadroj, diversaj
 metalaj bagatelaĵoj kaj sabroj de regimen-
 testro Klen malvarmigis per morta sia
 stato; la horloĝo ie en angulo de la ĉam-
 bro tiktakis malrapidege kaj sensone,
 preskaŭ oni ĝin ne aŭdis; kvazaŭ iu pa-
 ŝus sur tapiŝoj en molaj eluzitaj ŝuetoj kaj
 timis piedpremi ilin. Io ekpemis mian ko-
 ron, kiam mi rememiriĝis tion kaj mi pa-
 roladis poste al Anita ĉiam pli arde, pli
 sincere...

Anita min ĝoje bonvenadis. Alie mi estis
 indiferenta por ŝi, mi scias; nur mian vo-
 ĉon ŝi amis, ĝi forpelis la silenton el najlo-
 fermitaj ejoj de ŝia luksa malliberejo. Ŝi
 certe sopirjis ion alian, ekstere de tiuj mu-
 roj kaj super imago de konvenaj rilatoj,
 sed en tiuj ĝardenoj ne estis jam la floroj
 por ŝi...

Regimentestro posttagmeze dormis; li
 preskaŭ dormus tutan tagon. Kiam proksi-
 miĝis 4 horo Anita ekleviĝis, por ke ŝi lin
 veku. Ŝi multe devis klopodi por tion
 akiri; alkondukis lin al lavovazo, lavis per
 malvarma akvo lian kapon kaj bruston
 vestis lin per negliĝa surturo kaj alkon-
 dukis lin en salonon trinki kafon.

(Daŭrigo.)



KRONIKO

DE ASOCIO.

Ĝenerala kunveno de ĉae okazos dimanĉe la
 13-2 en Praha. La programo estos ĝustatempe
 sciigita al ĉiu membro. Ĉiu membro havas la raj-
 ton persone ĉeesti aŭ sian voĉon transdoni al alia
 membro ĉeestonta rajtigante lin por tio per trans-
 dono de sia legitimacio.

Grupanoj, ĉu vi jam pagis al via grupo la koti-
 zajon por 1921? Grupoj, ĉu vi jam sendis la koti-
 zajon 2 K por ĉiu via membro al Ĉ. A. E.? Postulu
 poŝtan transpagilon!

Isoluloj, ĉu vi jam renovigis vian kotizajon 10
 K? Aliĝiloj kaj transpagiloj haveblaj ĉe la sekr.
 Rud. Hromada, Praha-VII., Sochařská 333.

Ekzamena komisiono de ĉae. Laŭ rezultato de
 ekzameno la 5 I. 1921 en Praha ricevis ateston pri

scio de esperanto S-ro Ladislav Krisl, faka instruisto en Lom. La plej proksima kunveno de la komisiono okazos finon de marto. La ekzamenaliĝojn akceptas kaj informojn donas prez. dr. Stan. Kamaryt en Bratislava, ŝtata lernejo. Dr. St. K.

La ministraro de instruado prof. Šusta vizitis la 14. I. prez. de Ĉae eksdirektoro Eiselt kaj por Germana Ligo prof. Süsler el Žatec kun instruisto Taubmann, red. de la Marto el Haida. La deputacio prezentis peton, ke la nedeviga instruado de E. en lernejoj estu subtenata oficiale, almenaŭ en tia grado, kiel dum la ministro Habrman. La ministro promesis informi pri la afero.

La ministerio de instruado per sia dekreto de la 30.-X. 1920 N-ro 67.780 konsentis la petskribon de ĉ. Asocio E. kaj permesis, ke ĉe la ekzamena komisiono por elementaj kaj burĝaj lernejoj okazu ankaŭ ekzamenoj pri Esperanto; oficiala ekzameno estis nomita S-ro J. Eiselt, gimnazia eksdirektoro (por ĉefaj lernejoj) kaj D-ro Bischitzky (por la germanaj. La instruistoj, kiuj petos pri la permeso instrui E. kiel nedevigan instruadon ne forgesu citi tiun ĉi favoran decidon de la ministerio.

Samtempa propagando farita en aŭtuno kaj vintro 1920 de Naciaj asocioj en Danio, Hungario, Estonio, Holandio, Italio kaj de Esp. Klubo en Praha kaj Pardubice estos ripetata de februaro, laŭ la jena programo: 20. II. instruistoj, 27. II. studentoj, 20. III. bontemplanoj, 30. III. kantunuigoj, 20. IV. junulaj unuigoj, 20. V. kolektistoj. — Modelan tekston de la instigletero sendos la sekr. de ĈAE. Tie ĉi eĉ izolitaj samideanoj povas doni gravan helpon.

Esperanta teatraĵo en Praha estis prezentita de gemembroj de Esperantista Klubo la 6. XII. 1920 dum Amuza vespero aranĝita de la Financa Sekcio de la Kongresa Komitato en Remeslnicko-živnostenská beseda, Karlova ul. Ĝi estis unuakta komedio „Maliĉuloj” laŭ Kotzebue, ludita siatepepe dum la Dresdena kongreso. Partoprenis: F-inoj Hodíková, Vlčeková, Vokřálová, S-roj Bunzel (Verda Stelo), Hromada jun, Koutek, Lukáš, Šopirov (Ruso), Sugar (Slovako), Šustr, Ulrych, Waldstein. Reĝisoro S-ro Bunzel. Oni ludis freŝe kaj sukcese. Ankaŭ la cetera programo kontentigis la vizitintojn, kiuj estis 200 personoj. La arion „Bruas pinoj sur deklivoj” el opero Halka (ludita en E. dum la kongreso en Krakow) bele kantis F-ino M. Kutová; S-ro Lukáš recitis spritajn versojn. La vespero aranĝita por helpi al la Kongresa Kaso rezultigis rimarkindan sukceson financan (1000 K), al kio atribuis ankaŭ buĝedo prizorgita de S-inoj el Klubo kaj Rondeto. Koran dankon al ĉiuj. Hmd.

III. Labora kunsido de orientbohemiaj esperantistoj okazis la 12. XII. 1920 en Červený Kostelec. Partoprenis ĝin 79 (!) p. el 16 lokoj. Matene parolado de S-ro Sklenčka „Pri nia organizo. Post komuna tagmanĝo, je duono dela 3, S-ro Ing. Berger el Moravany, prezidanto, malfermas la laboran kunvenon. Sekvas raportoj pri la stato de la movado en la lokoj reprezentataj; el ili vidiĝas, ke en la orienta Bohemio estis dum 1920 aranĝitaj en 13 lokoj sume 22 kursoj kun 568 p. Leteron de S-ro Hromada, sekr. de ĈAE legas S-ro Sklenčka. La letero inter-alie enhavas alvokon al sistema propagando gazeta. 9 samideanoj promesis sendadi regulajn raportojn aŭ notizojn pri E. al entute 24 gazetoj. S-ro Ing. Berger rekomendas kursojn por instruistoj. S-ro Sklenčka proponas

aranĝon; de konstanta migranta ekspozicio; la proponon realigi S-ro direktoro Poppe el Pardubice. Oni rakontis siajn spertojn pri instruado de E. S-ro Sklenčka instigas al aranĝado de kursoj por progresintoj kaj pri la historio de la movado. Por la vizito de la kongreso oni propagandu en privata korespondado kun fremdlandaj samideanoj, ŝparu monon kaj perfektigu sin en la lingvo. La venonte labora kunveno okazos la 6. de februaro 1921.

Praha. La kunvenoj de Esperantista Klubo, ĉiuvendrede en kaf. Union estas vizitataj de kreskanta nombro de esp-istoj, tiel ke la Klubejo vidiĝas nesufiĉa. En ĉiu kunveno S-ro Pitlik raportas pri progresoj faritaj en preparoj por la Dektria. S-ro Hromada malfermis la 8. I. novajn kursojn: elementan (80 p.) kaj konversacian (45 p.), ĉiun merkredon kaj sabaton de 6—8 en lernejo „U Jindřicha”. — Krom tio ĉiumerkrede post la 8a kunvenas rondeto de Klubanoj por kompari kaj prepari siajn tradukojn de bohema teksto, sub gvidado de S-ro Hromada, kiu sendados la tradukotajn tekstojn al ĉiu, kiu aliĝos. Koncerne la detalojn legu la artikolon de red. H. Hodler en Esperanto (1919): „Ellernu”.

Brandýs n. Orli. La 19. XII. prof. Čermák el Ústí n. Orli. parolis tie antaŭ 90 p. La 9. I. 1921 komenĉiĝis kurso (35 p.).

Chrudim. S-ro Gallat, supera financa konsilanto, malfermis kurson privatan por 10 p.

Karvin. S-ro Badura gvidas kurson.

Košice. Kurson gvidas S-ro Friedrich.

DIVERSAĴOJ

Atentigo! La Progreso de nun aperados regule la 15. de ĉiu monato. Tiu ĉi numero malfruiĝis pro translokiĝo de nia presejo. La malfruiĝon la legantoj bonvolu pardoni.

El familio de la progresanoj. So. Adolf Stratil, banka ofic. el Bratislava kaj fino. Anička Jufíková geedziĝis la 24 jan. — Koran gratulon kaj deziron de konstanta feliĉo por la venonta kunvivo!

Oni laŭdas... Nina Silbersteckenová el Praha, tre sincere dankas al sinjoro Walter Buchheim, samideano en Boulder, Colorado, pro lia afabla sendaĵo de bonega lakto.

Poŝta transpagilo estas aldonita al tiu ĉi numero! Bonvolu ĝin uzi por tuja reabono.

Bibliografion kaj multajn interesajn raportojn ni enpresos en la venonta numero. Pro multe da materialo ni devis ĝin ellasi el tiu ĉi kajero.

Instruistoj! Kelkaj germanaj kolegoj plendis, ke oni ne permesas al ili plue la instruadon de Esp. en iliaj lernejoj. Se tio okazis ankaŭ al iu alia instruisto, li bonvolu nin tuj informi, ĉar kune kun deputito Remeš kaj reprezentantoj de la Ligo de germ. esp. soc. ni pro tio plendos ĉe so. ministro.

Esperanta laboristo, socialista, sindikalista, liberecana, internaciista. Formato 23x30 cm. Red.: E. Adam, 24 Boulevarda Beaumarchais, Paris, XI. — Adm.: L. Glodeau, 177 Rue de Bagnolet, Paris, XX. — Tiu gazeto fariĝis la oficiala organo de »Liberriga Stelo« (tutmonda asocio de internaciistoj). — Enhave plej interesa kaj leginda. La socialistoj havas nun en la manoj bonan ilon, kiu certe tre helpas la disvastigon de nia lingvo en progresemaj mediojn. La abonprezo varias laŭ la landoj.

Nia gazeto estas en Bulgario multe abonata. Tiu ĉi fakto pravas, ke la amika rilato inter ni reviviĝas kaj pro tio ni sincere ĝojas. Ni esperas, ke

dum la kongreso en Praha ni havos la okazon premi la manojn al multaj, tre multaj sudslavaj fratoj.

Holandajn samideanojn, precipe tiujn, kiuj veturos al la Kongreso de Praha ni atentigas pri la artikolo „Ĉeĥoslovaka Respubliko“, kiun en la novembro numero de la holanda revuo „De Gido“ publikigas prof. dr. Van Wijk. La aŭtoro vivis sep semajnojn en nia lando kaj objektivite rakontas siajn travivitaĵojn.

Vieno (Aŭstrio). La *Bohema Klubo Esperantista en Vieno*, dum la pasinta jaro vigle laboris kaj akiris 50 membrojn; kursoj estis kviditaj de s-roj Franc Pauchastek kaj por socialista junularo de s-ro N. Stary, redaktoro de „Videňské Listy“, gazeto, kiu ofte kaj fervoje pri Esperanto raportas. — Esp. Soc. „Danubio“ VII., Lerchenfelderstrasse 23, araĝis dum la jaro 1920 kelkajn kursojn por komencantoj kaj progresintoj, Paroladojn interesajn faris s-ro Maschl kaj Lumbildparolado s-ro H. Schicketanz, je la 13a de dec. la societo aranĝis Zamenhofan — mena feston, ĉeestis 70 gegastoj el la diversaj vienaj Esp. societoj. — Esp. Junularo Wien, estos refondota, junaj amikoj skribu al samideano s-ro K. Kosina, Wien IX. s. Vasag. 30.

Wien. Nova kunvenejo. Unua Esp.-Unuiĝo en Wien, la plej malnova esp. societo de tiu ĉi urbo, kiu dum 6 jaroj eldonis esp. gazeton (German-Aŭstria Esperantisto), havis dum pli ol dek jaroj kiel sidejo la adreson Wien, I., Stubenring 24. El la tuta mondo vizitis samideanoj kiel ĉiam kore akceptataj gastoj tiun ĉi kunvenejon, kies adreso estas konatigita diversmaniere per presajoj ĉiulande. Jam tial estas devo, sciigi al la ŝatinda esperantistaro tutmonda, ke tiu ĉi kunvenejo esperantista ne plu ekzistas! Komencante nun, la Unua Esperanto-Unuiĝo en Wien kunvenos en la novelektita klubejo: Wien, I., Himmelpfortgasse 6, Kafejo Frauenhuber, meze en la centro de la urbo. Ĉiuvendre, post la 7a vespere okazos la ordinara kunveno, kaj lunde je la sama horo, estos la estrarkunsidoj. La redakcioj de la esp. gazetaro estas petataj atentigi pri tiu ŝanĝo, kaj la societoj bonvolu anonci tion al siaj membroj, por ke ili notu la novan adreson, ĉar multaj personoj interrilatas al la nomita Unuiĝo.

Universala Sport-Ligo. Dum la Kvina Kongreso de la Itala Esperantistaro estis fondita *Universala Sport-Ligo*. Ĉi celas per Esperanto plifaciligi kaj plimultigi rilatojn inter la ĉiulandaj sportistoj kaj sportistaj institucioj. La centra sidejo de U. S. L. estas provizore starigita en Locarno (Svisujo), sekretario: S-ro Stefano Pedrazzini, Locarno. Dum la proksima Universala Esp. Kongreso en Praha okazos ĝenerala kunveno de U. S. L. kaj en Praha estos samtempe organizotaj sportistaj konkursoj por la esperantistoj. U. S. L. intencas eldoni, kiam ĝi nombriĝos almenaŭ 500 membrojn, tutmondan revuon pri sporto ŝakludo, fotarto. — Ĉiuj esp. sportistoj estas petataj senprokrasta aliĝi al U. S. L. aldonante precizan adreson kaj sciigi al ni pri kiu fako ili interesiĝas. U. S. L. serĉas konsulojn por ĉiu lando kaj vickonsulojn por ĉiu urbo. Por Italujo estis elektita kiel Konsulo S-ro De Masi, Pissa. Sendu aliĝon al la ĝenerala sekretario (S-ro Stef. Pedrazzini, Locarno). U. S. L. havas segvantajn fakoj: laŭteniso, piedpilko (foot-ball), ĉasado, ŝakludo, aviado, auto, motociklo, fot-kolektantoj, ciklismo, naĝado, glitumado, Gimnastiko k. t. p.)

La Kristana Esperantista Ligo (K. E. L.), kies agadoj devis ĉesi dum la milito, nun estas restarigita. Ĝia oficiala organo, kiu antaŭe eliris de Köln-Dellbrück (Germanio) denove aperas sub la malnova titolo „Dia Regno“ kune kun la ĵurnalo „Kristana Espero“, eldonejo de Kristana Espero, Lahia, Finnlando. La redakcio de „Dia Regno“ troviĝas ĉe Paul Hübner, Reesenberg 56, Harburg, ap. Hamburg (Germanio). Fervoraj Kristanaj Esperantistoj estas kore petataj aliĝi al K. E. L.

La „Katolika Unuiĝo Esperanta en Wien“ decidis la 10an de Decembro, aranĝi kun la „Ika“ en Augusto 1921 jenon: La katolikaj kongrespartoprenontoj veturos de Praha tra Ĉ. Budějovice, St. Valentin per rapidvagonaro al Melk. Tien la Vienaj Esperantistoj veturos renkonten. La noktpasigo en Melk. Poste per vaporŝipo tra „Wachau“ (belega pejzaĝo) al Nussdorf-Wien. Tie per la montfervojo sur la Kahlenberg. Tie belega perspektivo. Per ornamitaj tramveturiloj tra la urbejo; E-Diservo (eble en la katedralo de S-ro Stefano). Plue per specialvagonaro Gracon. (3 hora vojaĝ-intertempo sur Semering, la montkonata alp-kuracejo.)

„**Kristana Espero**“, bone redaktala 2-monata internacia kristana revuo aperonta en Lahia (Finnlando) dum la jaro 1921 kiel provizora organo de la en Hago fondita „Kristana Esperantista Ligo“. Abonojn en Ĉeĥoslovakio akceptos „La Progreso“, Poděbr. tř. 6, Plzeň. Abonprezo estos 1 svisa franko aŭ 12 stampitaj respondkuponoj. Mensendo per poŝtmandato, ĉeko, bankbileto aŭ respondkuponoj.

0000

DEZIRAS KORESPONDI.

(La enpresado kosta 2 Kč.)

Praha-Strašnice (Ĉeĥosl.). No. 94. So. Karel Straka interŝanĝas p. m. laŭ Michel 1920, Tellien 1921, kaj esp. gazetojn. Unua rekom. senda petata.

Král Vinohrady (Ĉeĥoslovakio), Bradlova 19. So. Pavel Vacek, inĝ. st. deziras korespondi kun studentoj-hemiistoj el ĉiuj landoj.

Plzeň (Ĉeĥoslovakio), Lobežská 12. So. R. Jar. Slavík, literaturisto, deziras korespondi pri ĉio.

Plzeň (Ĉeĥoslovakio), Letná 84. So. Lad. Proskovec dez. koresp. kun ĉiuj landoj.

Plzeň (Ĉeĥoslovakio), Doubravka 220. So. Edy Kotora dez. koresp. kaj ŝanĝi p. m. kun amikoj kaj amikinoj en ĉiuj landoj.

Nýřany apud Plzeň Nro. 143 (Ĉeĥoslov.) Sro. J. Dolanský deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj per P. K., ŝanĝas P. M.

Bukovsko (Ĉeĥoslovakio) 78. So. F. Švingr, dez. koresp. per il. k., leter.: espe, ruse, serbe; Aorano; interŝ. Fotografiojn, naturajojn. Ĉiam respondas!

Ústí n. Orlicí (Ĉeĥoslovakio). So. Vašíček Norbert, poŝtof., deziras korespondi kun esp. el Finnlando, Hispanio, Portugalio kaj ĉiuj esp. ekster-europanoj, precipe kun Japanoj kaj Ĉinoj. Ĉiam respondos!

Ústí n. Orlicí (Ĉeĥoslovakio). Fraŭlino Manjo Morávková, oficistino, interŝanĝas il. k. kun esp. el ĉiuj landoj. Ĉiam respondas!

Nové Město n. Met. (Ĉeĥoslovakio). Fino Vlasta Dvořáková, studentino, koresp. per p. k. kaj let. Ĉiam resp.

Nové Město n. Met. (Ĉeĥosl.). So. Rud. Dvořák, studento, interŝ. p. m., ĉefe kun la skoltoj de la tuta mondo. Ĉiam resp.

Stodo 136 u Plzně (Ĉeĥoslovakio). So. Rud. Šindelář, dez. koresp. per il. p. k. kaj intereŝ. p. m.
Staňkov u Plzně 217 (Ĉeĥoslovakio). So. Fanuš Ernst koresp. per p. k. kaj let., intereŝ. p. m.
 Užok, župa Užhorod (Subkarpata Rusio, Ĉeĥoslovakio). So. Cirilo Pařizek, dez. koresp. per k. il. kaj let. Certa resp.

Wellington (New Zealand), 26. Bidwell St. So. W. E. Currie, koresp. per k. (markoj bildflanke) p. k. il. kaj let. kun tuta mondo.

Luĉenec (Ĉeĥosl.). Busbak A. v. 5. So István Markus, koresp. esperante, hungare, germane per p. k. kaj let.

Luĉenec (Ĉeĥosl.). Fajaňsky ul. 37. So Howard Adler, koresp. esperante, hungare, slovake, germane kaj angle per p. k. kaj let.

Kralupy n. Vlt. (Ĉeĥosl.) Lobeček. So. Olda Šreiter koresp. per p. k. kaj let., intereŝ. p. m., fotografaĵojn kaj gazetojn. Ĉiam resp.

Reval (Estonio) Paska st. 11 K. 4. So. V. Konstantjuk, dez. koresp. per p. k. kaj let., interŝaĝi p. m.

Bruxelles (Belgio). 678 ch. de Warterloo. So. F. Schopen, dez. koresp. per p. k. kaj let.

ALVOKO.

Samideanoj, kiuj okupas sin per studado de spiritalismo! Spiritistoj! Okultistoj! Granda trezoro da fortoj, kies malkovro certe gvidus al pli bona estado de l'homa vivo, estas ankoraŭ kaŝita antaŭ ni! — Ĉu ne estas ebla ankaŭ en tiu fako tutmonda kunhelbo per nia Esperanto?... Aro da senlacaj esplorantoj, kies gvidanto nuntempe estas MUDro K. Vojáček, serĉas kunlaborantojn en la tuta mondo. — Programo: 1. Senĉesa interrilato inter la esplorantoj (necesega!), 2. helpa servo pri fakaj gazetoj kaj 3. se eble fakaj kunvenoj dum internaciaj kongresoj esperantistaj! — Ĉiu samideano, emanta kunlabori, anoncu sian adreson al O. Sklenĉka, del. UEA, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakio!

SKRIBMAŜINOJ

Granda stoko de la unuakvalitaj markoj Remington, Underwood, Royal, Oliver, Victor, Adler k. t. p. novaj duonovaj. Riparoj interŝanĝoj kaj remodeligoj. Rubandoj karbonpapero kaj ĉiuspecaj apartenaĵoj. Maŝinoj por multiplikado. Instituto por multiplikado de leteroj k. t. p.

JAN B. VLACH, PRAHA II.

Národní 38 n. 2. etaĵo (Ĉeĥoslovakio).

Dopisnice s obrazem presidenta
T. G. MASARYKA
 vydala admin. „La Progreso“
 kus 30 hal., 10 kusů 2.70 Kč, 100 kusů 24.— Kč.

Esperantistě! Ĉtěte knihu Dr. Stan. Kamaryta:
O DVOJÍ PRAVDĚ
 Pro naše předplatitele přímo v naší administraci za Kč 12.— místo za Kč 14.— poštou o Kč 1.65více.

Knihy, jež možno obdržeti v naší administraci.
 (Při objednávce poštou nutno připočísti poštovné).

- B. Tittl: Slovník esperantsko-český, vázaný Kč 7.50
- Slovník esperantsko-český, brož. Kč 5.—
- Časopis »La Progreso«, roč. 1918 Kč 4.50
- Časopis »La Progreso«, roč. 1919 Kč 6.—
- Tittl: Krátká mluvnice Esp. Kč 0.30
- Čejka: Slovník esp.-čes., brož. Kč 7.50
- Čejka: Slovník čes.-esperantský Kč 3.—
- Čejka-Krumpholz: Podrobná mluvnice Esperant. Kč 7.—
- Čejka-Krumpholz: Malá mluvnice Esper. Kč 2.80
- Esp. movado en Moravio Kč 4.—
- Kamaryt: Úvahy o jaz. mezinár. Kč 0.80
- Jazyk všeslovanský a Esp. Kč 0.20
- Kühnl: Úplná učebnice esperanta: c) vazba v plátěném hřbetě Kč 14.40
- Kühnl-Procházka: Slovník česko-esper.: b) brožovaný Kč 18.—
- Vortoj de Zamenhof, na lepšfm papíře Kč 6.—
- Sherlock Holmes Kč 4.50
- Výtah z Kotzina: Na obranu esper. Kč 2.40
- Co je esperanto Kč —.20
- Krestanov: Bulgara lando kaj Popolo El proksima oriento Kč 20.—
- E. Privat: Vivo de Zamenhof Kč 48.—

Via horloĝo iros precize se vi ĝin donos por rebonigi al



Fr. Novák,
 horloĝisto en Praha I.
 Malé nám. 10.
 Magazeno de horloĝoj kaj juveloj. - Vendejo de esper. signoj de Esper. klubo en Praha.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Respcnda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.